

ESPERANTO PROVENCE

Numéro 78 - Septembre 2009

4 numéros par an

Vorto de la Prezidanto

La ferioj finiĝis kaj mi esperas, ke vi trapasis agrablajn feriojn. Sendube multaj eksterlandanoj vizitis vin, kaj inverse. Kia ĝojo kaj riĉigo tiuj interŝanĝoj! Mi pensas ankaŭ pri tiuj, kiuj partoprenis diversajn staĝojn por lerni aŭ pliboniĝi (vidu raporton de Thierry Spanjaard pri la Uk en Bjalistoko de Pierre Oliva pri Plouezec aŭ Jeanine

Ratouchniak pri Brazilo. Ĉiuokaze, la rekomenco permesos al ni projekti novajn kunagadojn, renkontojn, vojaĝojn por la simpla plezuro praktiki esperanton, kaj esperantolaboron por progresigi nian aferon, ĉefe en tiu Internacia Jaro de Akaordiĝo.

Pierre OLIVA

OKAZOS... OKAZIS... OKAZOS... OKAZIS... OKAZOS... OKAZIS... OKAZOS... OKAZIS... OKAZOS... OKAZIS...

Ĉefaj venontaj eventoj

KULTURA SEMAJNFINO la 28an kaj 29an de novembro en La Ciotat

Stage culturel les 28 et 29 novembre. Venez avec vos amis :

- enkonduka kurso de esperanto por viaj amikoj, kunuloj ktp (Renée Triolle) - *Cours intensif pour débutants*
- konversacio surbaze de «Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj» (Monique Arnaud) - *Conversation*
- jogo kun Arlette Plutniak - *Yoga*
- diskutoj pri Hungario (Katarina Farago el Hungario) - *Discussions sur la Hongrie et massages Yumeiho*

Aliĝilo kun prezoj sur aparta folio. - *Voir l'adhésion sur l'intercalaire*

FORUMOJ de ASOCIOJ

- Okazis: la 12an de septembro en La Ciotat
- Okazis: la 13an de septembro en Aix kaj Marseille
- Okazos: la 3an-4an de oktobro en Avignon

EKSPOZICIOJ

- en Manosque la 19an kaj 20an de septembro, kadre de «Journées Européennes du Patrimoine» socidomo, salono A (04 92 72 39 89)
- en La Ciotat de la 18a ĝis la 26a de septembro, kun la PacMovado: enkondukaj lecionoj pri esperanto; esperantopacmovado; Hiroŝima; embargo de Kubo, kie

okazos la UK2010; tago de la Eŭropaj Lingvoj (04 89 60 61 93)

PRELEGVOJAĜO

Laŭ invito d'Esperanto-Provence, de la 20a ĝis la 30a de novembro, vizitos nian regionon Hungarino Katarina Farago, kiu fakiĝas pri Yumeiho-masaĝoj. Jen la nuna kalendaro: Nice, Saint-Raphaël, Marseille (la 24an en CIRA, 3 rue Saint-Dominique, inter Canebière kaj Saint-Charles), Gap (25an-26an), La Ciotat (27-29an).

Pliaj informoj ĉe Monique Arnaud,

monique.arnaud@aliceadsl.fr

aŭ 04 92 50 03 07

INFORMSTAĜO en MANOSQUE

Stage d'Information à MANOSQUE 04

LABORIS LA KOMITATO: ĉiuj komitatanoj vojaĝis al La Ciotat la 11an de septembro por la aŭtuna komitatkunsido.

Estis decidite sendi informcele la aŭtunan numeron de «Espéranto-Provence» al la ducento de adresoj, kiujn ni havas kaj poste sendi ĝin nur al pagintoj. Abono restas je 5 eŭroj.



Kunvenis la Komitato de Provenco la 11an de septembro en La Ciotat

Peti de homoj, kies retadreson ni havas, ĉu ili ne deziras aliĝi al la retlisto Provenco por ricevi tuj informojn.

Proponi ĉu ret- ĉu paperversion de la bulteno. Sin anonci al la kasisto Michel Cerisay - 15 place des Vents Provençaux H, 13140 Miramas aŭ mcerisay@gmail.com.

Repagi la vojaĝkostojn al la komitatkunsido je 0,34 eŭro/km aŭ laŭ 2a-klasa trajnbileteto.

Peti subvencion de la Regiono por la staĝo en Agay.

Starigi TTTejon kun ligoj; ĝin funkciigos Franz Mimmersheim.

Aparta atento estis dediĉita al la organizo de la staĝo en La Ciotat kaj al la Semajno en Agay.

EKSTERAJ RILATOJ

«L'espéranto en vacances», organizita de Le Grand Portique en La Ciotat okaze de la apero de «Espéranto de Poche» ĉe Assimil la 10an de julio. Kelkaj interesitaj konstatis, ke

ili malmulton scias pri la landoj de Eŭropa Unio, ne parolante pri aliaj landoj de la mondo.

Landa kunveno de SEL en Carpentras (84) *Service d'Echanges Locaux* grupigas homojn, kiuj pripensas alternativan solvon al la nuna ekonomio. Renée Triolle partoprenis la 20an de aŭgusto la internacian tagon, atentigante pri la lingvo-problemo en komunikado. Evidentiĝis ke partoprenas la tutan programon tri aliaj esperantistoj, inter ili Anne Amblès, kiu de pluraj jaroj kunlaboras.

«Var-Matin» aperigis, laŭ iniciato de Prezioso el Saint-Raphaël artikolon pri la du francaj esperantistaj biciklistoj, kiuj atingis Iranon.

Café polyglotte en Manosque; jen interesa iniciato por diskonigi esperanton inter lingvo-amantoj 04 92 72 39 89

EKSPOZICIMATERIALO: ne estas mistero, homoj scias pri esperanto, kiam esperantistoj mem parolas pri la internacia, justa lingvo. Esperanto-Provence disponigas senpage al la grupoj aŭ individuoj serion de paneloj pri la lingvo. Kaptu la okazon reklami pri esperanto dum ekspozicioj en via urbo aŭ vilaĝo. Pri kalendaro, sinturnu al Monique Prezioso, 04 94 83 06 88

aŭ prezmoni@hotmail.com

ILI GASTIS EN PROVENCO

Eble pluraj esperantistoj gastis en Provenco, ĉu kadre de Pasporta-Servo, ĉu ĉe longtempaj amikoj.

La 2an de septembro vizitis La Ciotat la Prezidantino de Dana Esperanto-Asocio, Ileana Schroder kun sia edzo. Ni multe parolis pri la Universala Kongreso, kiu okazos en 2011 en Kopenhago sed ankaŭ pri la klimatŝanĝoj pro la varmo en suda Francio sed ĉefe pro la monda Konferenco, kiu okazos en Kopenhago decembre.

Alia vizitanto estas Ingrid Maier, germandevena profesoro pri rusa lingvo en la Universitato de Uppsala (Svedio), kaj lastsemajne en septembro paro el Latvio.

Ĉiam okazas amika pikniko merkrede, kie eblas interŝanĝi libere pri la plej diversaj temoj.

Pliaj informoj ĉe 04 42 71 42 74 aŭ triolle.renee@wanadoo.fr

Post la eŭropaj balotoj, Pierre Oliva aperigis artikolon por danki la centojn da homoj, kiuj voĉdonis por la listo Europe-Démocratie-Espéranto. Reagis urba konsilantaranino de Le Castellet, kiu aranĝis kunven-diskuton. Espereble sekvos konkretaj paŝoj kun eŭropaj movadoj.



Vizito svedino Ingrid Maier 09.2009

ILI FORIRIS DE PROVENCO

Somero estas grava momento en la vivo de Esperanto ĉar okazas diversaj renkontiĝoj. La ĉefa restas la Universala Kongreso de Esperanto, kiun UEA organizis jubilee en la naskiĝurbo de Zamenhof, Bjalistoko. Kiel kutime, la Francoj estis la plej granda grupo post la gastiganta urbo. El nia regiono, homoj el Marnosque, Orange, Cavailon, Marseille, Belcodène, La Ciotat, Saint-Raphael, Grasse, Guillaume, ktp. estis impresitaj de la laboro de la organizantoj kaj subtenon de la urbo por esperantigi la urbon. Unuafoja partoprenanto, Thierry Spanjaard el Marseille priskribas siajn impresojn:

MIA UNUA UK : Malkovrante Esperantujon

Antaŭ la kongreso

Mi lernas esperanton de pli ol du jaroj sed mankas uzi la lingvon en internacia kunteksto. Do de kelka tempo mi volis iri al UK (Universala Kongreso) por praktiki kun eksterlandanoj, kaj lerni pli pri esperanto. Mi estis interesita de la Jokohama kongreso sed en tiu tempo, mi ne sufiĉe bone parolis. En 2008 mi havis aliajn planojn. Do en 2009 en Bjalistoko (Pollando) estis la bona oportuneco

por iri al mia unua UK.

Mi aliĝis antaŭ kelkaj monatoj, kaj poste ricevis la duan bultenon, tre profesion libreton enhavantan ĉiujn detalojn pri la kongreso. Mi tuj pensis «estas tre granda kaj tre profesia organizaĵo. Mi certe havos bonan kaj interesan tempon».

Trante al la kongreso: alveno en esperantujon.

Mi veturis al Bjalistoko trajne kaj la lasta etapo estis de Varsovio al Bjalistoko per loka trajno dum 2 horoj. Kiam mi entrjniĝis, mi tuj sentis min en esperantujon! En mia kupeo estis unu esperantisto el Varsovio kaj kvar el Hungario. Dum la tuta vojaĝo, ni parolis kune



pri multe da aferoj. La du polaj junulinoj, sidantaj kun ni estis konvikataj de esperanto antaŭ ol alveni en Bjalistokon!

Alvenante en Bjalistokan stacidomon, mi tuj vidis flagrubandojn kun la verda stelo bonvenigantaj nin al la kongreso. Antaŭ ol eliri la stacidomon estis donitaj broŝuroj kaj planoj de Bjalistoko en la internacia lingvo.

Dum la kongreso: ĉio per KN

La UK estas granda afero kun pli ol 1 850 partoprenantoj eĉ kelkaj bedaŭris la UKon de 1987 en Varsovio kun preskaŭ 6 000 partoprenantoj. Por mi estis sufiĉe granda afero por esti kelkfoje perdita kaj renkonti multajn homojn. Dum la tuta kongreso, ĉiu estas identigita de sia KN, sia Kongresnumero. Multe da homoj sin prezentas per la KN antaŭ ol doni sian nomon! Se vi ne havas aŭ se vi ne bone memoras



vian KN, vi simple ne ekzistas!

La kongresa solena inaŭguro estis tre formala afero. Estis tiom serioze, ke mi pensis esti en la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj! Poste mi devis elekti diversajn prelegojn ĉar multe da kunvenoj kaj prelegoj okazas samtempe... Inter aliaj mi elektis prelegojn pri «teleskopoj», «distraj matematikoj», socilingvistika komparo de du diasporaj lingvoj, la jida kaj Esperanto en interreto» aŭ la kunvenon de ATEO «Altrudo de religio en la publikan vivon en diversaj landoj». Mi estis frapita de la alta nivelo kaj de la kvalitoj de la prelegantoj. Mi estis frapita ankaŭ de ilia bona esperanto-

mastrumado: kelkaj parolis tiel rapide, ke mi ne povis ĉion kompreni.

Mi ankaŭ ĉeestis en la kunveno de la Akademio de Esperanto, kiu estis tre serioza afero. La publiko faris demandojn al la akademiaj, kiuj donis diversajn opiniojn pri gramatiko, vortprovizo, verbaj formoj ktp. Mi ne ĉiam komprenis la demandojn, ankoraŭ malpli la respondojn sed estis interesa kaj bona pruvo, ke



la lingvo estas vivanta.

Alia parto de la kongreso estis la kultura programo kun kantoj, teatraĵoj, dancoj kaj multe da aferoj. La kultura programo ĉefe okazis en la kongresejo mem sed la teatraĵoj okazis en la urbo. Mi vidis du teatrajn pecojn: «La domo sur la landlimo», tre amuza elvokado pri surrealaj registardecidoj kaj iliaj influoj sur la vivon de ordinaraj homoj, kaj «Ludoviko Lazaro» pri kelkaj momentoj de la vivo de Zamenhof. Kelkfoje surprizoj okazas! Iam vespere, mi estis sur la centra placo de Bjalistoko dum klasika koncerto de la Festivalo de Podlaĥio (la regiono, kies ĉefurbo estas Bjalistoko) kaj aŭdis operon kantitan Esperante kaj la 4an movon de la 9a Simfonio de Beethoven interpretitan en Esperanto de ĉirkaŭ 30 ĥoristoj kaj 4 solistoj. Mi estis ambaŭfoje impresita kaj kortuŝita aŭdi ĝin en Esperanto. La organizantoj de la kongreso faris grandan laboron por esperantigi la loĝantojn de Bjalistoko: multe da ŝildoj tra la urbo havis esperanto-version kaj multe da restoracioj proponis esperanto-menuon. Mi eĉ

povis aĉeti poŝtmarkojn en la poŝtoficejo Esperante!

Kompreneble, la pli bona parto de la kongreso estas ties partoprenantoj! Estas ĉiam facile renkonti homojn kun kiuj paroli. Kelkfoje mi alvenis en restoraciojn aŭ trinkejojn en Bjalistoko, renkontis esperantistojn (la pli granda parto de la kongresanoj neniam demetas sian ŝildon; montrante sian KN) kaj sidis kaj parolis kun ili. La kongreso estas ankaŭ ĉefa okazo renkonti esperantistojn, kies nomon vi legis en revuoj aŭ ĉe la reto.

Forlasante esperantujo

La kongreso finiĝis sabate matene. Mi veturis al Varsovio per trajno, kiu startas je la 10a: do mi ne povis atendi la solenan fermon. La pola fervojentrepreno ne bone antaŭplanis, ke la fino de la kongreso karambolos kun la komenciĝo de la ferioj, la 1an de julio, do en mia trajno multe da homoj staris en la koridoro. Inter tiu homamaso, pli ol triono estis esperantistoj. Dum la tuta vojaĝo mi daŭrigis paroli esperanton kun aliaj kongresanoj. Mi mem havis interesan novaĝon: kiam la loko de la UK 2011, Kopenhago estis anoncita dum la solena malfermo, mi tuj sciis per SMS kaj la novaĝo tuj kuris de buŝo al orelo tra la tuta trajno.

Poste mi veturis per alia trajno de Varsovio al Krakovo, mi konsciis, ke mi forlasis esperantujojn: kiam mi estis en la restoraci-vagono, mi ne povis komenci konversacion kun nekonata homo per «Saluton»

KN 638 (*Thierry Spanjaard - ts@who.net*)

DVD de fotoj aspl@gazeta.pl

A côté des centres d'espéranto, comme Le Château de Grésillon (49) ou Kvinpetalo à Bouresse (86) qui proposent tout l'été des stages d'une semaine pour pratiquer la langue, se perfectionner ou découvrir la région, à Plouezec (22) a lieu une semaine internationale. Pierre Oliva nous livre ses impressions

ESPERANTO-PLOUEZEC 2009

Ne pouvant participer au congrès d'espéranto de Bialystok en Pologne, nous avons choisi

si la Rencontre Internationale Espérantiste de Plouezec en Bretagne car déjà par deux fois nous avons pu y apprécier les activités sérieuses, variées et amicales. De plus, nous aimons cette région de France. Cette année nous pouvions y retrouver la Lituanienne Grazina OPULSKIENE qui enseignait dans un cours de «parolado por progresantoj». Nous l'avions déjà appréciée dans un stage à Grésillon en deuxième niveau et lors d'une tournée de conférences

à La Ciotat en 2005, d'où notre choix.



Nous n'avons pas été déçus: des cours sérieux, joyeux et dynamiques le matin. Pour les après-midis, de nombreux ateliers: yoga, chant choral, étude du chinois, théâtre et promenades commentées et une excursion en car à Pontrioux avec ses 50 lavoirs fleuris et le Château de la Roche Jagu. Nicole s'est perfectionnée dans les logiciels libres avec Pierre Cardona, informaticien de profession et je me suis adonné à la reliure avec le flamand Pierre Delmotte.

Que de belles journées remplies avec des soirées auxquelles participaient les villageois: danses bretonnes, chants, spectacles dont Jo-Mo, chanteur espérantiste (qui chante en 22 langues), conférence sur la Lituanie et l'Afghanistan avec films. Les enfants et adolescents du stage nous ont divertis avec un spectacle «Son et Lumière».

Une magnifique semaine baignant dans l'espéranto, paraissant trop courte malgré des journées longues et bien remplies.

Pierre Oliva - nipo@free.fr

Quant à Jeanine Ratouchniak, elle s'est envolée de Pologne pour le Brésil.

Espéranto-Provence: *Quel était le but de ce voyage?*

JR: avec l'Association ASPAS de Marseille (Association Solidarité Provence/Amérique du Sud) dont les buts sont d'informer sur la réalité économique et sociale de l'Amérique du Sud, appuyer les actions de défense des Droits de l'Homme, initier et soutenir des projets solidaires en Amérique Latine, je voulais découvrir le Nordeste, qui est une des régions les plus pauvres du Brésil. Le voyage était organisé par Leonor Harisque.

E-P: *Pourquoi choisir de visiter ce grand pays émergent avec cette association ?*

JR: pour visiter le Brésil autrement. Nous avons vu à Fortaleza une filiale d'Emmaüs, un centre de soins pour les gens des favelas, avec soutien psychologique, visité une école avec atelier de couture pour donner un métier aux filles, un dépôt-vente pour réhabiliter les gens par le travail, une faculté sur l'Ile de Marajo, Belem.

E-P: *cette Association partage les mêmes objectifs que «Bona Espero», cette ferme-école à Alto Paraiso de Goias bonaespero@terra.com.br qui recueille des enfants des rues pour les alphabétiser dans un esprit de tolérance et d'ouverture, leur donner un métier, les rendre autonomes en leur apprenant à cultiver leur jardin et leur enseigne en plus l'espéranto. Avez-vous eu des contacts avec les espérantistes?*

JR: non, à mon grand regret. J'avais écrit aux délégués de Fortaleza, où a eu lieu le congrès mondial en 2002, mais personne n'a répondu, peut-être un simple problème d'adresses électroniques. Car pour le Brésil, l'espéranto est la langue du 3^{ème} millénaire et récemment le Président Lula s'est montré favorable à l'Espéranto et j'ai rencontré sur un bateau lors d'une excursion à l'extérieur de Baia un jeune dont l'oncle était espérantiste.

E-P: *Comment vous, du CNRS, êtes-vous venue à l'espéranto?*

JR: par envie de communiquer plus facilement avec des gens de tous les pays, en direct, sans traduction

E-P: *Quelles sont vos impressions du Brésil?*

JR: C'est un pays avec un gros potentiel où règne la joie de vivre, où les gens ont envie de faire des choses innovantes, par exemple une association brésilienne crée un «pont social» entre les favelas, très rudimentaires, sans tout-à-l'égout, et les quartiers chics par la création de logiciels informatiques. Mais ce qui marque le plus dans cette partie du Brésil, c'est le mélange entre l'influence africaine et le catholicisme très puissant dans la musique, l'architecture etc.

E-P: *Merci d'avoir répondu à nos questions*

Cf Le Monde du 20 septembre : « Enseigner l'Espéranto au Brésil »

Niaj rendevuoj

21 septembre : Journée Mondiale de la Paix

26 septembre : Journée Européenne des Langues.

26 septembre : Pyramide de chaussures contre les bombes à sous-munitions , Aubagne(13), Cours Maréchal Foch 04 42 18 19 36 ; Le Luc (83) Place de la Liberté 06 17 64 31 08 ; Marseille (13) Place Stalingrad, Les Danaïdes 06 87 60 36 04; Nice(06)Jardins Albert 1er 06 64 65 06 28 ; Toulon (83) Place d'Armes 06 63 48 69 18 avec handicap International

20 novembre : Journée Mondiale de l'Enfance : La Convention Internationale des Droits de l'Enfant a 20 ans

10 décembre : journée des Droits de l'Homme

15 décembre : anniversaire de Zamenhof(1859) qui sera fêté à Manosque, St Raphaël et Avignon (le 13/12/2009)

Kiel atingi La Ciotat ?

Per aŭtoŝoseo Marseille- Toulon
El Toulon elirejo Saint Cyr direkten La Ciotat
El Marseille elijero La Ciotat

Per trajnoj

trajnoj Marseille : Toulon 08h33 en La Ciotat 09h02

Toulon : Marseille 07h55 en La Ciotat 08h21
08h27 en La Ciotat 08h53

Se vi vin anoncos, ni povos akcepti vin ĉe la stacidomo.

Kiel atingi la staĝejon ?

Maison du jumelage
Complexe Paul Eluard
Avenue Jules Ferry
13600 LA CIOTAT

(apud la naĝejo/piscine)

Tel. / fax: 04 42 08 15 32

Aŭtobusoj

10 (direkto "Fardeloup"),

haltejo Piscine

je la 08h15 aŭ 11h20

21 (direkto "gare routière")

haltejo Piscine

je la 08h15

40 (direkto "gare routière")

je la 07h35, 08h15, 08h45,

09h15, 09h55

au terminus, reprendre le 21


(un seul ticket, 1 €)

en 21 je la 08h00, 09h00, 10h00

Pliaj informoj ĉe : esperanto.laciotat@wanadoo.fr

Renée Triolle

Tel. 04 42 08 66 63 aŭ 04 42 71 42 74



WEEK END CULTUREL

à

LA CIOTAT

La Ciotat estas ĉarma urbeto, kies centro datumas de la 17a jarcento. Ĝi bele situas en golfo ĉe la Mediteraneo, ĉirkaŭita de montetoj aŭ el vulkana lafo aŭ el kalko.


La staĝejo proponas simplajn kondiĉojn : ĉambroj por 1-2 aŭ 4 homoj, necesejo kaj duŝejo en la koridoro. Necesas porti siajn tualettukojn.¹

La prezo, 40€, entenas la manĝojn de sabato tagmanĝo ĝis dimanĉa tagmanĝo kaj tranoktadon. Ebleco manĝi kontraŭ 10€ se vi anoncas vin antaŭ la 15a de novembro.²

Ebleco alveni jam vendrede kaj loĝi pere de esperantistoj. Bv vin anonci.

Dum la staĝo eblos ricevi 50 minutan masaĝon far Katarina, profesia Yumejo-masaĝistino kontraŭ 25 €; pagendaj surloke. Sed necesas aliĝi antaŭ la 15a de novembro.³

- 1- chambre à 2 ou 4 lits, toilettes et douches à l'étage. Apporter ses serviettes de toilette.
- 2- Le prix, 40 euros comprend les repas du samedi midi au dimanche midi, la nuit et le petit-déjeuner. Possibilité de ne prendre qu'un repas (10 euros)
- 3- Merci de vous inscrire avant le 15 novembre.



28-29 novembre 2009

Maison du jumelage, complexe Paul Eluard

Avenue Jules Ferry

13600 LA CIOTAT

(près de la piscine)

06 82 69 79 89 (pendant le stage)

ALIĜILO / ADHESION

Nomo

Adreso

Telefono

Retadreso (email)

Aliĝas al la staĝo en la Ciotat la 28-29an de Novembro.

Je m'inscris au stage :

Mi partoprenos 1^a 2^a
 la jenan kurson 15€
Je participerai au cours (25€ por paro) 3^a 4^a

Mi tranoktos kaj manĝos en la komuna manĝejo 40€
Je séjournerai à la Maison de Jumelage

Mi mem elturniĝos (je me débrouille)

Mi mendas aparte sabatan tagmanĝon
 la jenajn manĝojn 10€ *samedi midi*
Je ne prendrai que les repas. sabatan vespermanĝon samedi soir

dimanĉan tagmanĝon
dimanche midi

Mi petas masaĝon kaj krompagos 25 €.

Je m'inscris pour un massage et paierai 25 € sur place

Sume Kurso (cours)
 (total) Restado (séjour)
 Apartaj manĝoj (repas seuls)

Bonvolu sendi al : (Renvoyer avant le 15 novembre à)

Renée Triolle
 694 chemin de la Civade Verte
 13600 La Ciotat

Kun ĉeko al Esperanto-Provence. (chèque à l'ordre de Esperanto-Provence)

KULTURA STAĜO en LA CIOTAT

28-29 novembre 2009

Kvar nivelaj programoj laŭ via elekto kaj nivelo.

- 1^a: cours pour débutants, Méthode 10, avec Renée Triolle
- 2^a: conversation rondo kun Monique Arnaud surbaze de "Nordaj rakontoj"
- 3^a: enkonduko al joga (yoga) kun Arlette Plutniak.
Antaŭvidi kovrileton kaj sportan vestaĝon. (Prévoir une petite couverture et une tenue de sport)
- 4^a: kun Katarina Farago (Hongrie): diskutoj pri Hungario kaj Ymeiĥo-Masaĝoj

Vespere : vojaĝo tra Siberio (Le Transsibérien)

Pendant la durée du stage, possibilité de se faire masser par Katarina : les massages (ostéopathie) durent 50 minutes et coutent 25 €, à régler directement à Katarina. Merci de vous inscrire.

Vizito de la urbo dimanĉe posttagmeze.

La staĝo komenciĝos sabate matene.
 Le stage commence le samedi matin.

Sabate (samedi)
 ekde la 9a (9h)

akcepto de la partoprenantoj (accueil)

10-12 kursoj (cours)

12-14 tagmanĝo (repas)

14-18 kurso kun paŭzo (cours)

19 vespermanĝo (repas)

20h30 ... Le Transiberien

Dimanĉe (dimanche)

8-9 matenmanĝo (petit-déjeuner)

9-12 ... kurso (cours)

12-14... tagmanĝo (repas)

14-17 ... cours pour débutant (fin)

14-17 ... vizito de la urbo (visite

de la ville)